Eŭropa Bulteno

Julio/Aŭgusto 2019, Numero 194

# KONFERENCO DE EEU „EŬROPA LINGVA POLITIKO EN LERNEJOJ“ EN TRIESTO (ITALIO)




Kadre de 86a Itala Esperanto-Kongreso okazinta en itala urbo Triesto, ladlime kun Slovenio, okazis dum la unuaj du tagoj inter la 25-a kaj 26-a de aŭgusto 2019 eŭropnivela konferenco organizita de Eŭropa Esperanto Unio pri la temo „Eŭropa Lingva Politiko en Lernejoj“. Ni aŭskultis 4 prelegojn:

1. „Irlandaj spertoj de lernado de dua lingvo en bazaj lernejoj ekde 1922: kiel plibonigi la rezultojn?“, kiun prezentis dro Seán Ó Riain,
2. „Rezultoj de eŭropa projekto Multlingva Akcelilo“, prezentita de mag Zlatko Tišljar,
3. Vademecum de multdisciplina projekto: „Movebleco kaj inkluziveco en multlingva Eŭropo MIME“ prezentita de inĝ. Josef Reinvart kaj
4. „Lingva politiko kaj lingva justeco en nuntempa Eŭropo“ prezentita de dro Michele Gazzola.

La konferenca prelegejo estis plenplena kaj multaj kongresanoj estis interesitaj pri la prelegoj. Post la prelegoj abundis demandoj kaj rimarkoj. Ni aperigos ĉiujn prelegojn en la Eŭropa Bulteno. Kaj en tiu ĉi numero unue tiun de Zlatko Tišljar (vidu poste). Komence de la Konferenco estis prezentita 15-minuta video saluto de eŭropa komisionano dro Vytenis Andriukaitis.




La temaro montris gravajn aspektojn de lingva demando. Tišljar kaj Reinvart prezentis projektojn kiujn financis Eŭropa Komisiono kaj tiel montras sian praktikan subtenon por lingvaj demandoj, eĉ specife por Esperanto en MLA. Sean O Riain prezentis interesan sperton de Irlando kiu klopodas jam 100 jarojn lernigi al la irlanda popolo ilian gepatran lingvon, kiun la plimulto denaske ne parolas kaj Gazzola prezentis justecan aspekton de la nuna lingva sistemo en EU.

Mi esperas ke eblos eldoni libron du-lingvan (Esperanto kaj la angla) kun la kolekto de la prelegoj kaj tiel prezenti interesan rezonadon de E-sciencistoj unuflanke por la esperantistaro, sed aliflanke ankaŭ por interesitaj rondoj en EU.

Zlatko Tišljar

# VIDEO-MESAĜO DE KOMISIONANO VYTENIS ANDRIUKAITIS AL EŬROPA ESPERANTO-KONFERENCO KAJ ITALA E-KONGRESO EN TRIESTO – PREZENTITA LA 25AN DE AŬGUSTO 2019

Tre plaĉas al mi sendi miajn gratulon kaj bondezirojn al la komuna konferenco de la Eŭropa Esperanto-Unio kaj la Itala Esperanto-Konferenco en Triesto. Mi bedaŭras, ke ne eblis ke mi akceptu vian afablan inviton aliĝi al vi, sed mia laboro ne permesis tion.



Esperanto progresas malrapide sed certe. Pollando kaj Kroatio nun formale agnoskis Esperanton kiel parton de la netuŝebla kultura heredaĵo de tiuj landoj kaj de Eŭropo. Samideanoj en mia propra lando, Litovio, kaj en Slovakio laboras por simila agnosko.

Unu el la plej promesplenaj metodoj promocii Esperanton estas per la propedeŭtika metodo - la uzo de mallongaj Esperanto-kursoj por plibonigi kaj akceli lingvolernadon ĝenerale. Oni ĝenerale akceptas, ke sukcesa lingva lernado favoras postan lingvan lernadon. Estas malfacile pruvi, ke Esperanto-kursoj pli efikas por plibonigi lingvolernadon ol kursoj en aliaj lingvoj, sed estas tute logika al ni ĉiuj, kiuj lernis Esperanton. Esperanto havas flulinian strukturon, mankon de esceptoj al ĝiaj gramatikaj reguloj, kaj travideblan gramatikon. Ĉiuj el ĉi tiuj trajtoj kontribuas al pli rapida posta lernado de lingvoj. Kaj, kiel diras la diro, nenio sukcesas kiel sukceso. Mi precipe ĝojas, ke via konferenco en Triesto ekzamenos detale programon el via parto de Eŭropo, kiu celas plibonigi lingvolernadon ĝenerale.

La Multlingva Akcelilo estas programo financita de la Eŭropa Komisiono, en kiu 9 partneroj el 6 landoj kreas lernprogramon por 8-9 jaraj-studentoj de bazaj lernejoj en Bulgario, Kroatio kaj Slovenio. La lernprogramo ebligas al instruistoj de fremdaj lingvoj instrui propedeŭtikan Esperanton, tio estas zorge elektita parto de Esperanto kun la celo akceli kaj plibonigi la postan lernadon de aliaj lingvoj. Gravega novigo estas, ke la programo celas instruistojn, kiuj mem ne parolas Esperanton, kaj povas esti efektivigataj de ili post unu-semajna trejnado.
La programo nun estas en la fina fazo de disvolviĝo kaj ĉiuj ĝiaj celoj estas realigitaj. Post eksperimenta unujara elprovo en tri elementaj lernejoj kaj la studentoj kaj iliaj gepatroj, kaj kompreneble la instruistinoj, entuziasmis pri la sukceso de la lernado. La instruaj metodoj estas modernaj kaj uzas facile uzeblajn komputilojn. La infanoj lernas per komputilaj ekzercoj, dialogoj kaj skeĉoj. Post ĝia kompletigo, la lernprogramo aperos en ok lingvoj kaj

tial estos uzebla en dek eŭropaj landoj. Tiel, la nova unujara lernada celo havos potencialon atingi signifajn plibonigojn en la instruado de la dua aŭ tria lingvo en lernejoj, kaj povus fari signifan kontribuon por atingi la celon de la EU-politiko de multlingvismo, aprobita de la Eŭropa Konsilio en Barcelono en 2002 - ke ĉiuj civitanoj lernu siajn proprajn kaj du aliajn lingvojn.

Unu el la plej ambiciaj lingvaj projektoj iam ajn financitaj de la Eŭropa Komisiono finiĝis la pasintan jaron. La projekto Movebleco kaj Inkluziveco en Multlingva Eŭropo / MIME estis vere ampleksa. Ĝi daŭris de 2014 ĝis 2018, implikis 22 universitatojn en 16 eŭropaj landoj, kaj inkludas esploradon per pli ol 70 fakuloj el 11 diversaj disciplinoj, de ekonomio, edukado, financoj, juro, politika scienco, politika filozofio, psikologio al sociologio, socilingvistiko, tradukadaj studoj kaj urba geografio. Ĝi produktis pli ol 1.500 paĝojn de sciencaj kaj agadaj raportoj kaj pli ol 60 sciencajn eldonaĵojn specife dediĉitajn al projektaj rezultoj.

La sekcio de la MIME-Vademecum dediĉita al Esperanto estas aparte lumiga, kaj devus esti deviga legado por ĉiuj, kiuj havas rolon en la farado de politiko pri edukado. Ĝi priskribas Esperanton kiel "vivantan lingvon kun granda potencialo, kiu estas multe pli facile lernebla ol aliaj fremdlingvoj", kaj "efika kaj esprima rimedo de transkultura komunikado, permesante altajn gradojn de inkluziveco". Ĝi deklaras klare, ke "edukaj sistemoj ne ignoru Esperanton" kaj faras kvar specifajn politikajn rekomendojn:

1. Planlingvoj kaj interlingvistiko (la studo de planlingvoj) estu starigitaj kiel kampoj de instruado kaj esplorado en universitatoj.
2. Profesiaj instruaj materialoj por instrui Esperanton en lernejoj devus esti kreitaj.
3. Esperanto estu proponata kiel fremdlingvo en elektitaj lernejoj tra Eŭropo, kiel parto de kunordigita aliro por konstati ĝian valoron longtempe kaj grandskale. Ĉi tio postulus instruistajn kursojn por ĉiu partoprenanta lernejo kun normoj, kiuj garantias altkvalitan instruadon, kiel ĉe aliaj fremdlingvoj.
4. Ĉiuj aranĝoj por la antaŭenigo de Esperanto devus esti akompanataj de grandskalaj inform-kampanjoj, kiuj konsciigos la ĝeneralan publikon pri la fakto, ke ĉi tiu lingvo jam estas uzata tutmonde regule de homoj de tre malsamaj lingvaj fonoj.

La graveco de la MIME-esplorado ne estu subtaksata. Estas eble la unua fojo, ke tiom da fakuloj el tiom multaj prestiĝaj universitatoj agnoskis la valoron aŭ Esperanton mem. Nia lingvo ludas gravan rolon, ne nur en eŭropa edukado, sed ankaŭ en antaŭenigado de movebleco kaj inkludo, kaj tiel povas fari decidan kontribuon al eŭropa integriĝo. Ĝi povas permesi al eŭropaj civitanoj reteni siajn proprajn lingvojn kaj samtempe komuniki facile kun ĉiuj aliaj eŭropanoj. Kiel la brila Esperanta poeto Antoni Grabowski iam skribis:
“Kaj same fidelaj al hejma altar',
Ni sentas nin gefiloj de l'tuta homar'.”

Vytenis Andriukaitis, Eŭropa Komisionano por Sano

# OFICIALAJ JARAJ KUNVENOJ DE EEU



En Triesto dum la Itala Esperanto-kongreso okazis paralele ankaŭ la ĉefaj kunvenoj de la asembleo de EEU (ferma, oficiala, kaj malferma por la kongresanaro) kaj de la estraro. La asembleon partoprenis 10 asembleanoj el inter plenrajtaj 16 el landoj kiuj pagis kotizon por 2018. La asembleo akceptis ĉiujn raportojn (tiun pri la aktivado en 2018, kasistan kaj revizoran.) Same oni akceptis la laborplanon por 2019. Por 2020 la estraro sendos proponon al skriba voĉdono en novembro. Oni diskutis ankaŭ pri la jaro 2020, kiam estas elekto-jaro de EEU kaj prezentis kandidatojn por novaj 4 estraranoj (la kandidaton por kasisto ni ankoraŭ ne trovis) Estas trovita kandidato por nova sekretario de EEU – Alessandro Perna el Italio.

Dum la publika kunsido de la asembleo oni prezentis la ĝisnunan laboron kaj aparte la atingojn de eŭropa projekto Multlingva akcelilo kiu estu la centra okupo per kiu oni klopodu estonte fari paŝojn por eniri eŭropajn lernejojn.

La estrarkunsido okazis la 25an de aŭgusto kaj la asemblekusido la 26an de aŭgusto.

Maja Tišljar

# PRI GRAVAJ TERTREMOJ EN LA E-MOVADO PRO LA KRIZO DE UEA

Kvankam la politiko de EEU estas ne enmiksiĝi en la aferojn de nia supera organizaĵo, mi ne povis eviti la bezonon ankaŭ pro tio ke EEU estas kontinenta parto de UEA, paroli pri la krizo kiu tremigas UEAn, ŝajnas al mi la plej granda krizo post la dua mondmilito. Sekve mi dediĉas mian artikolon al miaj pripensoj pri UEA kaj tion mi verkas persone, mianome, sen interkonsenti kun aliaj estraranoj de EEU, do ĝi neniel estas oficiala starpunkto de EEU. Okazis ekstrema financa krizo, ĉar evidentas jam dum pluraj jaroj ke la elspezoj ĉiam pli superas la enspezojn kaj la profesia funkciado de UEA-oficejo kaj ties servoj simple ne plu eltenas tion. Neniu klopodo plibonigi la staton ene de ĝis nun funkciinta kotizpolitiko, sukcesis. Mi ne analizos ĉi tie, ĉu la paŝoj por savi la CO-on estis bonaj aŭ ne, mi simple ripetas ke la kaŭzo de tiu krizo (kion la plimulto jam bone scias) estas ne UEA mem, sed la



mondaj cirkonstancoj kiuj jam ŝanĝis esence la ekonomian funkciadon kaj informadon de la la merkatoj. La problemojn kiujn frontis UEA havas pli-malpli ĉiuj asocioj kiuj dum jardekoj funkcias per kotizoj de siaj membroj laŭ la logiko: se ekzistas membraro kiu pretas pagi kotizojn sufiĉajn por vivteni profesian organizon, kiu servos ilin, estu do tia organizo, kiu sin vivtenas el la membrokotizoj (kaj kotizoj de la propraj aranĝoj kia UK).

Nuntempe ĉiam malpli oni uzas klasikan monon por ion pagi, grava helpo ke UEA estis ankaŭ banko en kiu multaj el tiel nomataj nepagipovaj landoj ŝparis kaj pagis siajn movadajn bezonojn ne plu havas seriozan funkcion. Informojn kiujn la membroj ricevas kiel verajn novaĵojn en la E-revuo kaj aliaj paperaj informiloj, ne plu estas aktualaj pro interreto, en kiu ĉiu povas legi informojn tuj kiam ili okazas, senpage kaj sen kotizi, informoj pri E-aranĝoj en la mondo ankaŭ aperas en la reto kaj ĉiu povas senpage legi ktp. Simple ne estas serioza motivo por plejmulto de la membroj, aparte por la junaj, kotizi. Ankaŭ modernaj informrimedoj en la naciaj informejoj kaj privataj informcentroj de individuaj esperantistoj estas multe pli aktualaj ol la retejo de UEA, EEU ks. Ĉion tion UEA ne povis kontraŭstari. La mondaj ŝanĝoj superis gravecon de UEA. Wikipedio en E per aktivado de esperantistoj ekster iu ajn kunordigo de UEA, WikiTrans (Esperanto) iĝis sen UEA la plej mirinda informretejo leksikografia kun 5 milionoj da esperantlingvaj artikoloj pro scioj kaj kreado de Ekhard Bick, la konoj de junaj fakuloj kreis pliajn nekredeblajn kreaĵojn ekster UEA-membraro kiel laboro de Raymond Gerard kiu trovis softvaron por komputile mezuri oftecon de morfemoj en skribitaj tekstoj (konsideru ke tian softvaron havas neniu monda lingvo) kaj nombris la morfemoftecon en korpuso kun dek milionoj da vortoj – difinis absolute science kiuj morfemoj estas nepre uzataj en ĉiu teksto kaj kiuj malpli kaj kiuj tre malmulte. Tio ege helpas por krei lernolibrojn de E kiuj pliefikigos la instruadon. Chuck Smith iniciatis kaj ĉefaŭtoris la adapton de Duolingvo-kurso al Esperanto kiu pro sia populareco rapide atingis eĉ pli ol milionon da lernantoj, pluraj junaj esperantistoj iniciatis kaj riskis krei entreprenon en kiu oni uzas Esperanton kaj estas financataj de neesperanta publiko aŭ organizoj, plej ofte de eŭropaj fondaĵoj, kiuj ne nur sukcesas trovi la financadon sed ankaŭ kovri kostojn de pluraj profesiuloj. Muzika kreado foje profesia okazas ekster UEA. Tio estas nur ekzemplej plej konataj, sed ekzistas multaj aliaj malpli ampleksaj sed gravaj por adapti E-movadon al novaj cirkonstancoj. Oni povas resumi ke temas pri tri vojoj de financado de Esperanto-Movado kaj.Kulturo: financado per neesperantitaj fondaĵoj (EU), financado per reklamoj funkciante ene de tre grandaj portaloj, kiujn pretas kunfinanci Guglo pro ebleco reklami en ili kaj tria vojo estas: libervola fordono de sia tempo por Esperanto kadre de iuj propraj ideoj aŭ kune kun kelkaj aliaj kiuj pretas investi tempon kaj monon por projektoj priesperantaj.

Tio estas vojmontrilo por studi manieron kiel reorganiziĝu UEA.

Nun pri kelkaj funkcioj de UEA, kiujn neniu alia transprenis kaj kiuj laŭ mi estas tre gravaj por la estonteco de E-movado. UEA estas organizo de mondaj esperantistoj ekzistanta dum 110 jaroj (krom dum la 2a mondmilito) kaj ĝi zorgas pri tri aspektoj de la propra esperantista kulturo, tre grava kaj necesa ĉar tio ebligas ke ankaŭ la lingvo evoluas kaj adaptiĝas al la mondo. Tio estas ekzisto de Universalaj Kongresoj en kiuj dum sep tagoj funkcias vera internacia E-kulturo, Belartaj konkursoj, filma kaj teatra kulturo, muzika kulturo, univeritato en E pere de prelegaro kaj pritemaj diskutoj ofte rilataj al aktualaj mondaj temoj proponataj de UNESKO kaj UNO.

Kiu financus la plej modernajn poetojn en Esperanto kiuj ja estas malmulte legataj, se ne ekzistus Beletraj konkursoj ligitaj al kelkaj eldonejoj gvidataj de esperantistoj? Kiu stimulus aĉetadon de originala prozo kaj poezio, se ne ezistus libroservo sed ankaŭ libroservoj de privatuloj kaj naciaj organizoj?



Sed plej grave, kiu konservus la historion de la Movado pro kiu la lingvo ekzistas tiel longe. La nuraj du institucioj kiuj faras tion kaj al kiuj mi fidas pro tio ke ili daŭras centon da jaroj aŭ pli (UEA biblioteko kaj arkivo kaj kolektoj de Viena E-muzeo). Se foriĝus la profesia prizorgo de la esperanto-biblioteko kaj arkivo, ambaŭ estus en grava danĝero rapide malaperi. Tio estus katastrofo por la tutmonda E-historio. Multaj landoj havas aparte la proprajn arkivojn kaj iom da internacia libraro sed neniu havas tion en la sama skalo kiel UEA kaj IEMW (Viena Muzeo). Se do malaperas UEA Biblioteko kaj Arkivo, tio estus katastrofo. Pri UK kaj ĝia valoro mi ne timas, por ili ankoraŭ longe estos sufiĉe da kulturitaj kaj pri kulturo interesitaj esperantistoj kiuj pretos pagi sufiĉe altajn kongresajn kotizojn kiuj povas plu financi Kongresan Sekretarion kaj kongresajn kostojn, sed pri la du aliaj gravaj korservendaĵoj (Biblioteko kaj Arkivo) devas engaĝiĝi ankoraŭ konscia esperantistaro kiu invitu junajn esperantistojn ĉie en mondo proponi manieron kiel plu financi ilin? Modernigi ilin certe necesos, sed ankaŭ trovi rimedojn por tuja pludaŭro kiam kaj la Bibioteko kaj la Arkivo ankoraŭ praktike ne estas atingeblaj de publiko. Oni entreprenu iun kampanjon aŭ en kazo de nepreco transportu tiujn du konservendaĵojn al loko esence pli malmultekosta, sed sekura. Por tio mi ne havas konkretan proponon en la nuna novliberisma mondo kies nura celo estas zorgi pri akumulo de profitoj. Tia monda ĉirkaŭaĵo detruas multe pli gravajn aferojn kiel la naturon ĉirkaŭ ni, logike ĝi ne ŝparos la E-kulturon. Ni mem devas zorgi pri tiu nia trezoro. Multaj malgrandaj nacioj kaj minoritatoj malaperis kiam ĉesis intersiĝo de junaj generacioj pri la propra historio kaj kulturo. Ni devas investi iom da klopodoj al edukado de junaj generacioj pri nia historio kaj kulturo (ekzemplo estas E@I kiu kapablas kaj zorgi pri la E-kulturo kaj pri gejunuloj kaj pri necesa mono por profesia teamo kiu prizorgas ĉion).

Zlatko Tišljar

# VIDPUNKTOJ PRI LA MOVADO KAJ ESPERANTO DE NOVA PREZIDANTO DE TEJO



Kvankam la Esperanta mondo estas sufiĉe eta por esti longe for de inundego da nedezirata atento, post mia elektiĝo por prezidanteco de TEJO mi jam estas en kontakto kun multaj homoj, kiuj ĉiuj havas siajn proprajn ideojn pri TEJO kaj Esperanto. Mi ŝatas vortigi kelkajn el la komprenoj el tio ĉi tie, por ke ni havu pli sencan ĝeneralan dialogon pri tio kion ni faras.

Unue, TEJO estas kompleksa organizo, kaj abundas miskomprenoj pri tio kio ĝi estas, kiel ĝi funkcias kaj kion oni atendu de ĝi. Mi devas konfesi ke ankaŭ por mi longe daŭris por taŭge kompreni ĉion. Sed kerna, grava punkto estas ke ĝi konsistas el junaj Esperantistoj kaj reprezentas ilin, ne nepre (aŭ nepre ne?) nur por promocii Esperanton kaj alporti la finan venkon.

Por mi TEJO jam longe estas grava parto de la kara Esperanta tutmonda familio, al kiu mi apartenas. Mi iam priskribis tion tiel, ke eĉ mian plej grandan malamikon en la Esperanto-mondo mi prezentus al eksteruloj kiel mian karan amikon. Parte simple ĉar prezenti kiel familianon al multaj aspektus stulte, sed ankaŭ ĉar mi scias ke neinterkonsento ne venas el malamo kaj malico, sed simple el la sama pasio kiu antaŭenpuŝas min mem.

Due, kion ni volas atingi per kaj pri Esperanto memstare estas tute ne klara kaj vastiĝanta afero. Esperanto dum la tempo akiris tiom da idealoj kaj kulturoj de siaj parolantoj, kaj forlasis post si multajn malnovajn miskomprenojn pri niaj reciprokaj kulturoj.
La mondo vere estas jam multe pli eta, kaj mia generacio de Esperantistoj komencis per hazarda malofta interreta kontakto ĝis la nuntempa ĉiutaga komunikado kun multaj karaj amikoj, pli karaj ol ajna samurba kaj samlanda neesperanta amiko.

La defioj kiuj unuavide aspektas kiel la disfalo de la Esperanto-mondo miavide estas precipe la kreskodoloroj por bone enkorpigi ĉi tiun novan realecon en la vejnojn de niaj organizoj, kiuj fondiĝis en tempo kiam fizika realeco kaj ĉeesto estis la sola vera realo, dum nun ĝi iĝas pli pezo ol helpo.

Niaj idealoj jam ne estas la samaj. Niaj sukcesoj ne kongruas kun la malnovaj idealoj. Sed mi sentas nun, survoje de la IJK en Slovakio hejmen en Nederlandon kie venontjare okazos IJK en Someren, ke pli ol “simplan” finan venkon, kiu okazus per ia ajn konvinkado pruvi nian magiaĵon, ni sukcesis ion multe pli bonan.

Ni kreis modelon de pli bona mondo. Ekzemplo por la mondo kiun oni povas referenci por konsciigi homojn ke alia mondo ne nur eblas, sed jam ekzistas kaj kreskas, ĝis fine plene forpuŝi ĉion kio ne sukcesas adaptiĝi al la spirito de nia tempo. Spirito en kiu Esperanto havas gravan gvidan rolon pro la simpla kialo ke ni amas unu la alian kiel familion en tempo kiam ĉiuj malamas unu la alian pro la plej hazardaj opinio-diferencoj.
Ni jam atingis finan venkon. Nia rolo nun nur restas kultivi tiun nian kulturon de interkompreniĝo kaj amikeco internacia en tia nivelo ke pli kaj pli da homoj envie aliĝos.

Joop Kiefte, prezidanto de TEJO

# ESPERANTISTOJ ELEKTITAJ EN MUNICIPAJ BALOTADOJ

Kelkaj esperantistaj amikoj estis elektitaj en la municipaj balotadoj okazintaj en majo en Hispanio:

- Isidoro Ortega, prezidanto de la esperantista grupo en Fuenlabrada (granda urbo de la aglomeraĵo de la ĉefurbo Madrido) daŭrigos kiel Unua Vicurbestro, kaj magistratano pri prezidenteco, modernigo, malferma administrado kaj edukado (en la foto de la hispanlingva parto, meze apud la urbestro)
- Manel Sales, membro de la klubo Tarragona Esperanto, estas la nova vilaĝestro de la bela vilaĝeto Renau, kiu troviĝas meze de vitejo, 12 km. for de Taragono.. Kelkaj klubanoj ĉeestis la posteniĝon (vidu suban foton) kaj gratulis la novan vilaĝestron.
- En Teruelo, eĉ du anoj de la loka esperanta grupo Liberanimo partoprenis en la unua loko de siaj respektivaj balotaj organizaĵoj, kaj estis elektitaj kiel magistratanoj de la urbo: Blanca Villarroya (sekretario de la grupo) kaj Anabel Gimeno.

Ni gratulas ilin ĉiujn kaj deziras bonan sukcesan agadon. Se iu el niaj legantoj konas aliajn kazojn, bv informi nin.

Bit-Bulteno de HEF



# SVEDA MINISTRINO SALUTAS LA KONGRESON EN FLUA ESPERANTO!

Surpriza evento de la ferma ceremonio en la ĵus finiĝinta Universala Kongreso en Lahtio estis la videa salutparolo de Amanda Lind, sveda ministrino pri kulturo kaj demokratio **EN FLUA ESPERANTO!**
La videa saluto estas spektebla en nia fejsbuka paĝo de Ret-Info: https://www.facebook.com/Ret.Info/

Ret-Info / Lingvo-Studio, LS

# ĈEA-KONGRESO EN BRNO KAJ ESPERANTO-MUZEO SVITAVY

De la 17a ĝis la 20a de oktobro okazos jubilea kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (50-jariĝo), al kiu mi kore invitas ankaŭ aŭstrajn esperantistojn, des pli, ke ĝi okazos en Brno, do proksime al Vieno. Jen ĉi tie pliaj informoj. Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne vizitis Svitavy (Zwittau) kaj tiean Esperanto-muzeon mi volas aldoni, ke ĝi troviĝas nur 65 km de Brno sur trajnlinio de Brno al Prago, do valoras per unu vojaĝo al Ĉeĥio viziti ambaŭ. Krome, estas ankaŭ eblo veni al la Eo-muzeo en Svitavy jam pli frue, dum la malfermo de la nova ekspozicio, kiu okazos jam la 14an kaj 15an de septembro 2019. Jen ĉi tie.

Petro Chrdle

# RAPORTO PRI LA 52-A KONGRESO DE ILEI EN ĈAĈAK (SERBIO)

La kongresanaro povis malkovri la belan folkloron de Serbio kaj de la regiono de Ĉaĉak spektante tre belan nacian vesperon dimanĉon vespere. Koruso el 12 virinoj kun nomo «Ĉaĉaka Liro» regalis la kongresanojn per plej belaj kaj variaj kantoj. Infana grupo «Bambi» el 6 knabinoj kaj 6 knaboj dancis lokajn dancojn vigle kaj gaje en belegaj buntaj kostumoj.

Lunde matene okazis la solena malfermo en ĉeesto de la vicurbestro Sinjoro Vladan Milić kaj de la dekanino de la fakultato Sinjorino Danijela Milošević. La virina koruso denove aperis kaj kantis nian himnon kun niaj aldonaj voĉoj kompreneble. Ambaŭ gravuloj substrekis la honoron por la urbo akcepti tiom gravan internacian eventon. Ni revidos la dekaninon okaze de la dutaga Konferenco, kiu okazos en la universitato kadre de nia Kongreso ĵaŭdon kaj vendredon, malfermita al lokaj instruistoj kaj profesoroj. La temo de la Konferenco estas la kongresa temo: «Lernado en virtualaj komunumoj».

Lundon posttagmeze okazis denove komitatkunsido kaj paralele lingvokursoj en du niveloj kaj kurso pri la serba lingvo. La unua parto de la 58-a AMO-seminario (Aktivula Maturigo) temis pri eksteraj rilatoj; Mireille Grosjean prezentis la diversajn zonojn de Eŭropo, iom pri UNESKO kaj UN kaj raportis pri siaj spertoj en siaj kontaktoj kun diversaj landaj delegacioj kaj ministroj.

La fama aktoro Saŝa Pilipović aperis en teatro vespere en la vestaĵoj de Galileo Galilei; per sia vervo li amuzis nin sed ne nur, ĉar la teatraĵo ankaŭ enkondukas pripenson pri la sinteno de persono, kiu akiris sciojn aŭ kapablojn, kiuj ĝenas la kutimojn kaj povas alporti problemojn. Ĉu silenti, rezigni, aŭ «kuraĝe antaŭen!», jen la demando.

La prezidantino de ILEI: Mireille Grosjean

# KOMUNA DEKLARO DE ŜTATPREZIDANTOJ DE EU



Delo, la plej grava slovena tagĵurnalo aperigis la 9-an de majo 2019 sur la 7a paĝo sub la titolo „Eŭropo estas la plej bona elpensaĵo inter ĉiuj kiuj aperis iam ajn“, komunan deklaron de la ŝtatprezidantoj en ŝtatoj de EU kun invito al la civitanoj iri al la balotoj: la komuna deklaro ja principe estas laŭdinda, kvankam tro malfrua kaj enhave nekompleta.

Se la prezidantoj ankaŭ en la pasinto estus turnantaj sin al la popolo okaze de gravaj

momentoj en la evoluo de EU, ni ne estus nun tie ĉi kie ni estas – kun ĉiam pli da fenomenoj de naciismo, pli signifa kresko de faŝismo, diskreskanta kaj al la popoloj fremda burokrataro, limigoj de parolibero kaj informado, enfermiĝo de internaj limoj, nedecida kaj neklara ekstera politiko, eliro de iuj landoj el la membreco ktp – la Eŭropo de paco, libereco , egaleco. demokratio, fideleco al komunaj valoroj, de partnereco, estas evidente en danĝero.

Kaj kio estas la plej danĝera, estas ke la gejunuloj antaŭ ĉio eluzas multajn utilojn de nova EU, adaptiĝas al la principo de „pano kaj ludoj“ sed ne kapablas kritike pensi pri la vera stato kaj bezono ŝanĝi multon - almenaŭ dum balotoj.

En la plej bona kazo en la estonta Eŭropa Parlemento multa tempo kaj energio estos uzata por interbatado inter detruaj naciismoj kaj integrigaj valoroj. Kaj jam ĉiukaze demendinda evoluo de EU kaj ĝia signifo estos malpli certaj. Dum la prezidantoj en la deklaro parolas pri forta Eŭropo, kie ni estos partneroj kaj ne kontraŭuloj, kaj pri defioj kiujn ni venkos per forta ekonomio kaj pli granda sociala kohezio, ĝuste rilate la interligitecon de civitanoj, mi volus atentigi pri ankoraŭ unu aspekto kiun oni pretarvidas. Ĉu intence? Temas pri lingva politiko kaj demokratio en EU. Se la prezidantoj serioze parolas pri egaleco, kohezio, demokratio, tiukaze oni ne rajtus daŭrigi la ĝisnunan lingvan diskriminacion, koloniismon kaj mensogadon. Privilegiita uzo de unu nacia lingvo, nuntempe la angla, estas kontraŭa al ĉiuj internaciaj dokumentoj, aparte rilate ĝeneralan deklaron pri homaj rajtoj (uzo de gepatra lingvo kaj egalrajta interkompreniĝado).

Eŭropo estas nuntempe en rolo de janiĉaroj (devige ensoldatigitaj junuloj el okupitaj popoloj en granda Turkio) kiu disvastigas la anglousonan lingvon kaj kulturojn. Disvastigantoj de la angla kiel iuspeca mondlingvo similas al iamaj disvastigantoj de la rusa en Orieneŭropaj landoj. Civitanoj de Eŭropo meritas alian eblecon por vera kaj justa lingva demokratio, egaleco, kunlaboro kaj interligiteco.

Temas pri la uzo de la internacia lingvo en ĉiuj formoj de senpera kontakto inter parolantoj de diversaj gepatraj naciaj lingvoj, kie ĉiam formiĝas batalejo por superrego. Antaŭ nelonge okaze de 15-jariĝo de eniro de Slovenio en EU-on niaj ĵurnalistoj montris staton en la ĉelima Gorizia (itala) kaj Nova Gorica (Slovena) kaj en ĉelima Radgona/Radkersburg (At). En ambaŭ kazoj elstaris neligiteco kaj nekunlaboro de la homoj ambaŭflanke de la limoj. Evidente temas pri nekapablo de interkomunikado pro senpera kolizio de du divarsaj naciaj lingvoj. Kaj same en ĉi tiu kiel en aliaj similaj ekzemploj ĉe ni kaj en la mondo oni devus uzi la konatan solvon uzi trian nacie neŭtralan lingvon. UNESCO jam dufoje (en 1954 kaj 1985) akceptis rezoluciojn kiuj invitis la ŝtatojn disvastigi la internacian lingvon Esperanto. Ankaŭ la slovena nacia komisiono por UNESKO bone konas la enhavon de ambaŭ UNESKO-rezolucioj.

Estas tempo ke alispeca Eŭropo montru alian vojon sur la kampo de lingva demokratio. Ni iros nur unu tagon baloti aŭ ni eluzos ĉi tiun okazon por daŭra egalrajta kunlaboro kaj intergriĝo.

Janez Zadravec

# MULTLINGVA AKCELILO
# PRELEGO DUM LA TRIESTA KONFERENCO

Stato en junio 2019

**Kio estas MLA?**



En novembro 2017 startis la projekto Multlingva Akcelilo, kiun financas Erasmus+, fondaĵo pri edukado de Eŭropa Komisiono per proksimume 250.000 eŭroj. Ĝin iniciatis kaj enhave gvidas Inter-kulturo en Maribor (Slovenio) kaj la administra organizanto estas eldonejo Izvori el Zagrebo. Kunpartoprenas pliaj sep partneroj en entute 6 eŭropaj landoj. La celo de tiu ĉi projekto estas krei didaktikajn rimedojn por nova lerneja lernobjekto kiu dum unu jaro estus instruata al 8-9-jaraj infanoj en eŭropaj elementaj lernejoj. Tiu lernobjekto celas evoluigi en infanoj apartan konscion pri lingvoj ĝenerale kiu grave plirapidigos iliajn postajn lernadojn de fremdlingvoj. La projekto daŭros ĝis decembro 2019, kiam la didaktikaĵoj devos esti je dispono por ĉiuj elementaj lernejoj en EU. La Multlingva Akcelilo, 64-hora instruobjekto, baziĝas je tre elementa Esperanto, sekve lernante MLA la infanoj lernas Esperanton. La projekto havas 2 tute novajn celojn kaj aspektojn: Oni kreas lernobjekton per kiu infanoj kaj gepatroj ĝue kaj lude eniras la esencon de lingvoj. La unua tute nova aspekto estas ke la lernobjekton instruos lingvoinstruistoj kiuj neniam antaŭe lernis Esperanton kaj la dua nova aspekto estas ke oni ne instruos Esperanton kiel tutecan lingvon, sed nur minimumon uzatan en praktiko, kiu tamen ebligas ke la infanoj la lingvon ekparolu, ĉar temas pri la plej oftaj elementoj uzataj.

La didaktikaj materialoj evoluataj konsistas el instruprogramo por la geinstruistoj kaj ekzercoj por la gelernantoj kiuj estos disponeblaj ĝis la projektfino sur portalo MLA en 6 lingvoj de partneroj kaj la angla kaj Esperanto. La didaktikaj materialoj baziĝas je proksimume 250 plej oftaj morfemoj troviĝantaj en unua parto de la Zagreb-metoda kurso. La centra graveco de

MLA estas ke tiuj materialoj estas en konkretaj diadaktikaĵoj adaptitaj al 8-jaraj infanoj (tiuj, kiuj ne ankoraŭ konas fremdlingvojn kaj en la propra lingvo kapablas nur legi kaj skribi. La enhavan parton de MLA gvidis idea kreanto de la projekto Zlatko Tišljar kaj en tiu parto partoprenis ankaŭ la instruistinoj en 3 elementaj lernejoj, E@I el Slovakio kaj dro Eckhart Bick el Suddana Universitato de Odense.

La ĉefaj didaktikaĵoj uzataj estas kelkaj tradiciaj kiel legado de leciona teksto kaj tradukado kaj kantado de aparte verkitaj kantoj por la bezonoj de la koncerna lernbloko (2 lernohoroj). Aparte oni evoluigis ekzercojn kiujn oni uzas en lingvo-instruado sed ne en tiel frua fazo (ekde la unua leciono) kiaj aparte verkitaj dialogoj kaj skeĉoj kaj ekzercoj troviĝantaj en interreto. Sed tre aparta ekzerco estas tute nova en lingvoinstruado: kreado de frazoj el hazarde elektitaj vortoj kiuj tamen devas havi antaŭviditan sinsekvon en la frazo. Komence tiu ekzerco konsistas el vortkartetoj en diversaj koloroj kaj tial la ekzerco nomiĝas: frazkreado per kartetoj, sed post la dua leciono la ekzerco estas komputila, kiu mem prezentas multajn hazardajn frazojn kreitajn el materialo de koncerna bloko kaj inter kiuj duono estas gramatike ĝustaj sed sence malĝustaj. La infanoj devas decidi kiuj frazoj ne ĝustas kaj kiuj estas bonaj. Por fari tion ili devas koni la vortojn kaj kapabli traduki al sia lingvo tiujn frazojn. Tiu ekzerco estas tre ŝatata de infanoj kaj ĝi ebligas senpene lerni la vortojn kaj ekzerci frazkreadon en Esperanto. La plej ŝatataj didaktikaĵoj dum la eksperimentaj kursoj estis ĝuste tiu kun kartetoj, la kantado de kantoj kaj ludado en dialogoj kaj skeĉoj. Ankaŭ alispecaj ekzercoj uzantaj la interreton estas ŝatataj. La infanoj ne ŝatas klasikan lernadon de novaj vortoj (parkerumadon), kompletigadon de tekstoj en kiuj mankas iuj vortoj aŭ gramatikeroj kaj ili ne ŝatas la tradukadon. Konklude: ili ŝatas ekzercojn kiuj ilin aktivigas kaj malŝatas tiujn kiuj postulas pasivan aktivecon.




La tuta didaktika materialo devas ebligi ke la gelernantoj kapablu paroleti plej baze la lingvon kaj kompreni ekzercajn tekstojn esence kun la celo kompreni la bazajn strukturojn de ĉiuj lingvoj kaj tiel post tiu lernobjekto grave plirapidigi la lernadon de postaj fremdlingvoj.
Per la didaktikaĵoj kreitaj oni stimulas la postan lernadon de fremdlingvoj kaj de la propra gepatra kaj motivigas ilin lerni pro grave pli rapida kompreno de strukturoj de lingvoj ĝenerale.
MLA enkondukas novaĵon kiun ĝis nun neniu enkondukis. Pro manko de fakultate edukitaj instruistoj de Esperanto (krom kelkaj en Hungario), ni kuraĝis ekpraktiki la supozon ke ĉiuj instruistoj de fremdlingvoj kun bona kono de pedagogio por junaj infanoj, devus kapabli ekapliki tiun lernobjekton, se ili disponas pri bona didaktika rimedaro forme de instrukciaro, do ke la objekton MLA instruos profesiaj geinstruistoj, kiuj antaŭ ne lernis E-on kaj ĝin ne scias. La supozo ankaŭ eliras el la opinio ke ilia rolo ne estas instrui bonan Esperanton, sed iun bazan strukturon kiun ofertas morfemofteco en la Zagreba Metodo kaj kiu jam kvardek jarojn sukcese funkcias baze de science kaj komputile esplorita morfemofteco en parolata Esperanto. En praktiko MLA sukcesis pri tio pli ol antaŭvidite. Ĉiuj instruistinoj en la tri elementaj lernejoj (Slovenio, Kroatio kaj Bulgario) estis entuziasmaj pri sia nova rolo kaj ege sukcese realigis la kursojn kunpartopreninte en kreado de novaj didaktikaĵoj. Ili ne nur bone tion faris, sed entreprenis je propra iniciato unutagajn vizitojn de du relative proksimaj

lernejoj en Šentilj kaj Zagreb, kio ne estis antaŭvidita en la projekto kaj ne estis financata. Kompreneble, la reciprokajn vizitojn kun entuziasmo akceptis kaj infanoj kaj iliaj gepatroj.

La partneroj kiuj kunaktivis en la projekto estis du universitatoj (el Odense en Danlando kaj Maribor (Slovenio). La unua kreis komputilan programon por la jam menciita aparta ekzerco kiu generas multajn frazojn por difini, ĉu ili sence bonas aŭ ne, kio estis ege komplika tasko kiu inkluzivis ne nur hazardan kombinadon de vortoj, sed ankaŭ semantikajn analizojn kaj la Universitato en Maribor, kreis enketajn demandojn por la tri grupoj: Infanoj, geinstruistoj, gepatroj kaj testojn por mezuri propedeŭtikajn atingojn por la kurso. La tri lernejoj (Šentilj – Slovenio, Zagreb-Kroatio kaj Vraca – Bulgario partoprenis baze de ricevitaj didaktikaĵoj por la du unuaj lecionoj en kreado de la tria kaj kvara, E@I ellaboris la 5-an lecioonon kaj ĉion kunordigis Inter-kulturo el Maribor. Nun la tuta materialo estas finita. Eldonejo Izvori el Zagrebo transprenis la kunordigadon organizan (organizon de 4 kunsidoj de ĉiuj reprezentanoj – el kiuj tri jam okazis), helpon pri financa gvidado kaj distribuo de mono, zorgon ke ĉiuj realigu ĝustatempe du raportojn kaj sendon de raportoj al la financanto, La tri lernejoj efektivigis la provkurson. Laŭ la projekto ili estus devintaj realigi nur du unuajn lecionojn (dudek lernohoroj), sed ĉiuj tiom entuziasmis ke propravole ili daŭrigis kaj realigis ĉiujn 64 lernohorojn pro la deziro kaj de infanoj kaj de gepatroj. Studio Gaus el Berlino kreas elektronikan portalon kun instrukcioj kaj ekzercoj unue en la angla kaj poste en 7 pliaj lingvoj. Krome partoprenis kelkaj individuaj esperantistoj kiuj faris gravajn kontribuojn kiel Miguel Gutierez Aduriz kiu verkis kantojn kaj ankaŭ kelkajn originalajn melodiojn kaj Sean O Riain, kiu multe tradukis tekstojn en la anglan.
Post 18 monatoj de la projekto (entute ĝi daŭras 26 monatojn) oni sukcese kreis la necesajn didaktikaĵojn – la ĉefan produkton de MLA kaj okazis tri provaj kursoj de po 64 lernohoroj (32 blokoj) en la tri lernejoj, kiujn gvidis 5 instruistinoj kaj en kiuj komece lernis entute 40 gelernantoj kaj finekzameniĝis 32?

**Metodologio aplikita**




A) La didktika materialo lernata sekvas unuajn kvin lcionojn de la Zagreba Metodo en kiuj troviĝas ĉirkaŭ 250 morfemoj, plej oftaj en la ĉiutaga parolado kiu kovras 80% de la kompleta korpuso parolata.
B) Oni aplikas uzon de ekzercotekstoj aŭ en la lernolibron de ZM aŭ la portalon learn.esperanto.com.
C) La projekto aperigos instrukciaron por instruistoj kiuj klarigas detalojn kion la instruisto faru en ĉiu el 32 lernblokoj.
D) La instrukciaron kompletigas ekzercoj por la gelernantoj kiuj konsistas el
1. legado kaj tradukado el partoj de la tekstoj de la lecionoj,
2. kantado de kantoj kies tekstoj estas adaptitaj al materialo de ĉiu lernbloko (plej multaj estas verkitaj de Miguel Gutierez Aduriz)
3. aktoradoj de dialogoj verkitaj por ĉiu lernobloko (po 2 infanoj)

4. Aktora ludo se skeĉoj (en kiuj ludas tri aŭ 4 infanoj)



5. kartludo por krei frazojn kaj decidi pri ilia ĝusteco (kreitaj de komputilo)
6. Kompletigo de tekstoj kun mankantaj vortoj aŭ morfemoj
7. Interretaj ekzercoj ĉe learn.esperanto.com
8.Lernado de vortoj
9. Tradukado el kaj al Esperanto

Dum la kreado de la didaktika materialo kaj paralela apliko de tiuj didaktikaĵoj, la aŭtoroj korektadis tiujn ekzercojn kiuj en lernejaj klasoj montriĝis nesukcesaj (aŭ tro postulaj aŭ tro neinteresaj).

**Enketoj kaj tekstoj**

La Universitato de Maribor ellaboris intervjuan demandaron por la instruistinoj antaŭ la komenco de la laboro kaj fine de la kurso, demandaron por gepatroj kiujn ili skribe plenigis fine de la unua parto de la kurso (post dudek lernohoroj) kaj demandaron por la gelernantoj, Fine de la kurso estis aplikitaj testoj por gelernantoj.

a) Testo por esplori meta-lingvan konon, kiel celo estis vidi kiom la infanoj rekonas strukturon de la nacia gepatra lingvo sen aparte lerni la gramatikon kaj ricevi klarigojn (rekoni, tempojn, singularon, pluralon, kazojn, vortospecojn)
b) Testo por esplori propedeŭtikan atingon post la kurso en kiu la saman teston faris lernintoj de Esperanto kaj kompara grupo de lernantoj kiuj ne lernis E-on.
c) Interkultuo ellaboris ekzamenmanieron kiu celis vidi ĉu la infanoj atingis certan parolkapablon. La testo konsistis el buŝa parto en kiu ĉiu infano devis el la kapo paroli dum 3 minutoj pri unu el hazarde elektitaj 4 temoj (Miaj gepatroj, Miaj gafratoj, Miaj geamikoj, Miaj geinstruistoj) kaj skriba parto en kiu dum 20 minutoj ili skribis eseeton el minimume 10 frazoj pri unu el du temoj: Mia kurso aŭ Renkontiĝo kun slovenaj, resp. kroataj infanoj. (bulgaroj ne havis renkontiĝon, sekve ili skribis nur pri la unua temo)

En tiuj ekzamenoj inter 20 ekzamenitoj de la slovena kaj kroata grupo nur unu infano ne plenumis la postulatan kriterion: povi dum tri minutoj el la kapo elpensi kaj eldiri minimume 7 frazojn kiuj estas kompreneblaj kaj skribi minimume 10 frazojn (ne gravas kiom da eraroj, sed ĉu la tuto estus komprenebla al alilingva esperantisto).

Interrkulturo ankaŭ ellaboris enketilon kiun respondis ĉiuj infanoj: Kiuj el la didaktikaj metodoj plaĉis kaj kiuj ne. Estis 9 demandoj. La respondoj montris kion ni jam sciis laŭ raportoj de la instruistoj:

Al la infanoj tre plaĉis kantado de kantoj, ludoj per dialogaj tekstoj kaj skeĉoj, kartludoj por krei frazojn, komputilaj ekzercoj.

Malplaĉis lernado de vortoj (parkerado), kompletigado de tekstoj per mankantaj vortoj aŭ gramatikeroj kaj tradukado al kaj el Eperanto.
Testoj pri propedeŭtika valoro de la kapabloj montirs evidentan propedeŭtikan efekton ĉe la infanoj kiuj lernis E-on, sed ĝi ne estis sufiĉe alta: 15%.
Pro tio baze de novaj didaktikaj iloj eblos lanĉi novan projekton en kiu partoprenus deko de grupoj kun minimue 10 lernantoj (entute 100) kaj kompara grupo de almenaŭ ducent infanoj kaj efektivigi ĝin dum 3 jaroj. Tiu nova projekto devus konstati ne nur pro bona specimeno (sufiĉa nombro) sed ankaŭ per pli ellaborita testmaniero dum tri jaroj la ĝustan sciencan rezulton.
Krome tio konkludigis la aŭtorojn ke la didaktikaĵoj estis bonaj sed ne estis planita sufiĉa tempo por ripetado kaj ekzercado.

**Neantaŭviditaj efektoj**



Ĉiuj enketoj de eksperimentkomenco ĝis la kursfino montris ke la tri celgrupoj (gelernantoj, gepatroj kaj geistruistoj – kiuj antaŭ la projekto nenion sciis pri Esperanto) estis ege kontentaj pri tiu nova aktivado. Al la geinstruistoj plaĉis la lernobjekto kaj ebleco kiun ĝi donas por evoluigi ilian pedagogian kreivecon, al la gelernantoj plaĉis lerni facilan lernobjekton kie oni ludis, kantis kaj uzis komputilojn kaj nepre deziris daŭrigi tiun lernadon kaj al la gepatroj plaĉis ke la infanoj tiel entuziasmis kaj ke ili uzas sian tempon por io utila anstataŭ iu eble danĝera okupiĝo.

Ni planis solvi en lernejoj mankon de Esperanto-konantaj instruistoj per simpla transdono de tiu tasko al fremdlingvaj geinstruistoj kiuj jam troviĝas en la lernejo supozante ke la instrukciaroj de la uzo de novaj didaktikaĵoj estas sufiĉe simplaj kaj klaraj por profesiaj fremdlingvaj instruistoj kaj ke ili paralele kun la gelernantoj lernos Esperanton sen problemoj, ĉar ja Esperanto estas simpla por ĉiu kaj por profesiuloj ĝi devus esti tre simpla. Sed ni ne sciis ĉu tio vere estos senprobleme akceptita en lernejoj. Kaj tio realiĝis pli ol kontentige, ĉar ne nur ĉiuj akceptis sed iom post iom ekŝatis la aktivadon kaj mem komencis iniciati aferojn kiuj ne estis iliaj taskoj.

- Grava iniciato tiusence estis propono de la geinstruistoj mem organizi reciprokajn vizitojn de infanoj en du proksimaj lernejoj (Šentilj – Slo kaj Zagreb – Kro). Tio realiĝis dufoje, okazis unutagaj renkontuĝoj de la infanoj kaj geinstruistoj en ambaŭ urboj kaj la geinstruistoj deklaris ke la amikeco kiu evoluis dum tiuj renkontiĝoj estas ja celo de Esperanto. Tiu aktiveco estis pagita de la lernejoj kaj gepatroj, ĉar ili ne estis antaŭviditaj en la buĝeto de la projekto.
- La bulgaraj instruistinoj unuaj rimerkis ke disleksiaj infanoj en la klasoj multe pli senprobleme legis tekstojn en Esperanto ol en la propra lingvo kaj aliaj fremdlingvoj. Tion konfirmis instruistinoj ankaŭ en Kroatio kaj Slovenio, ĉar en ĉiu klaso troviĝis almenaŭ unu tia infano.
- Oni hazarde malkovris ke la centra problemo de fremdlingva lernado – parkerumado de novaj vortoj estis tre sukcese solvita per kartludo en kiu infanoj kombinante diverskolorajn vortojn el 4 aŭ 5 diversaj specoj kreadis novajn frazojn pri kies senco ili devis decidi ĉu ili estas bonaj aŭ ne. Tiu ludo tre plaĉis al ili kaj por bone solvi ili devis koni vortojn kiujn ili ricevis je dispono. Ili do serĉis la signifon en vortaro aŭ demandis

geinstruistojn. Ripetante tiun ludon ili parkeris la vortojn. En postaj lecionoj tiu ludo okazas per komputilo kiu liveras frazojn kiujn la infanoj devas same difini: ĉu sence bonaj aŭ ne.

**Problemo restinta**

Fine, post la testoj kaj ekzamenoj montriĝis ke tamen la finaj celoj ne estis plene kontentige solvitaj: Aktiva uzo de gramatiko kaj vortoj el pli superaj lecionoj (ili senprobleme komprenis kaj uzis ĉion el la du unuaj lecionoj, sed apenaŭ ion el la postaj lecionoj. La esenca kaŭzo por tio estis la fakto ke la tuta materialo estis tro ampleksa por la planitaj 64 horoj. Oni lernis daŭre novajn materialojn kaj ne havis tempon por ripetado. Krome, distanco inter la du lernoblokoj (ĉiusemajne unu lernobloko) estas multe tro granda. Oni multe pli forgesas dum tiuj 7 tagoj ol oni lernas dum la du horoj en la lernejo.

Ni decidis korekti la planitan kaj ellaboritan didaktikaĵaron mallongigante la lernmaterialon (enhave instrui nur 4 lecionojn de la Zagreba Metodo) kaj uzi la tempon por ripetado de antaŭaj scioj. Ĉar la gelernantoj simple ne lernas en libera tempo forirante hejmen, ni decidis stimuli ilin per sistemo de konkurso. La gelernantoj povos anonci sin por la ekzameno nur post kiam ili solvis 800 frazojn de la komputila ludo kaj tiel devigi ilin okupiĝi pri la afero preskaŭ ĉiutage hejme (3-4 frazoj tage). Kaj tiuj kiuj tre sukcese faros tiun taskon ricevos oran diplomon, malpli sukcesaj la arĝentan kaj la plej malbonaj ricevos bronzan diplomon, kio signifas ke ĉiu kiu atingos 800 frazojn senkonsidere pri la kvalito ricevos diplomon, sed tiuj kiuj ne montros siajn 800 frazojn ne ricevos diplomon.

Do, la mankantan tempon ni solvos per du manieroj: malpligrandigante la materialon kaj pligrandigante ilian lerntempon per hejma okupiĝado pri frazkreado en la komputilo.

**Konkludo**

Per Multlingva Akcelilo oni sukcese povas enkonduki en elementajn lernejojn en frua aĝo (post kiam la infanoj lernis legi kaj skribi en la propra lingvo) lernobjekton kiu antaŭas fremlingvajn lernobjektojn (antaŭ ol lerni duan aŭ trian fremdlingvon) sen apartaj kostoj kaj tiel atingi ke post du aŭ tri jaroj la infanoj lernante novajn fremdlingvojn atingos 20-30% pli rapidan lernsukceson kaj gravan ŝparon de tempo kaj mono, sed ne nur ĉe fremdlingvoj. Tiu antaŭscio de MLA ebligas ankaŭ gravan plibonigon de kompreno de la gramatiko de la propra gepatra lingvo.

Krome MLA liveras komplete pretan pedagogian kaj didaktikan materialon por tiu instruado. Sufiĉas nur uzi 64 horojn dum unu lernojaro por ricevi gravajn plibonigojn. La infanoj kiuj unue lernas MLA (en tria lernojaro) kaj en la kvina atingas la scion de tiuj kiuj ne lernis MLA sed jam en la tria lernojaro komencis lerni duan fremdlingvon, kaj en la sesa kaj pliaj lernojaroj ilia scio de fremdlingvo daŭre eksponenciale kreskas kompare kun la scio de gelernantoj sen kono de MLA.

Zlatko Tišljar

## Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.
Finredaktita: la 31-an de aŭgusto 2019
Redaktoro: Zlatko Tišljar
En la numero kunlaboris: Vytenis Andriukaitis, Zlatko Tišljar, Maja Tišljar, Joop Kiefte, Petro Chrdle, Janez Zadravec, Mireille Grosjean, BIT-Bulteno de Hispana E-Federacio, Ret-info
Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com
Retpaĝo: http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno

Eŭropa Esperanto - Unio
Por efika kaj maldiskriminacia komunikado
www.europo.eu